

Monata Gazeto TEMPO

1934-40

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 1990-009-A-3, 1990.04.19.21.

Cl.- Parolas Claude GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj ne estis tre facile fari historiajn esplorojn pri la disvolviĝo de esperanto, ĉar mankis la esplor-dokumentoj, interalie facile konsulteblaj revu-kolektoj. Ekde kelkaj jaroj la situacio rapide ŝanĝiĝas dankal la reeldono de gravaj revuoj. Kaj tiurilate la japanoj ludas modelan rolon. La reldono en 1974 de la revuo **Literatura Mondo** inaŭguris tre videble tiun reldonan agadon. Kreiĝis tiucele Kooperativo por Represo de Literatura Mondo ĉe Teikyo Universitato. Bedaŭrinde nur tricentekzemplera estis tiu reldono, kaj jam post kelkaj monatoj la 6-voluma grandformata revu-kolekto estis elĉerpita. En 1982 la eldona Societo de Nagoya Esperanto-Centro kuraĝe reldonis la faman revuon **Monata Gazeto Tempo**, kiu aperis en Kioto de novembro 1934 ĝis julio 1940. Ĝi fakte kovras 6 decidigajn jarojn kaj la dua mondmilito ĝin neniigis, kiel ĝi fakte mortigis multajn aliajn periodaĵojn kaj eĉ ties redaktorojn. Ni esperas, ke tiu belaspekta dika volumo grandformata bone vendiĝos, kaj ke tio kuraĝigos redaktejojn redoni vivon al revukolektoj jam ekde longe konsulteblaj nur en kelkaj privilegiaj lokoj. Persone mi estras unu el tiuj arkivejoj en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝi nomiĝas Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI). Laborante en ĝi ekde ĝia kreo en 1967 mi povis tralegi multajn revu-kolektojn. Mi tre aprezis **La Nica Revuo**, kiu reldoniĝis pasintjare. Kaj eble pluraj geaŭdantoj memoras la elsendaron, kiun mi faris antaŭ verŝajne dek jaroj pri tiu grava literatura kaj kultura organo. Ni tutcerte celebros la reldonon de tiu **Nica Revuo** reparaolante pri ĝi. Vi ankaŭ certe aŭdis, ke ankaŭ la unua esperanto-organo **La Esperantisto** ĵus reldoniĝis. Do ankaŭ ni raportos pri la kontakto, kiun tiu gazeto ebligas havi kun la unuaj jaroj de esperanto.

Hodiaŭ dankal la reldono de la **Monata Gazeto TEMPO** ni ekrigardu al Japanio, kvazaŭ ni estus en novembro 1934, kiam aperis la unua numero 8-paĝa.

Per **Saluto** ĝi prezentiĝis dirante:

"Jen antaŭ vi ankoraŭ unu Esperanto-gazeto, spite al pli kaj pli multiĝantaj eldonaĵoj en nia lingvo. Kian rolon plenumi? Ekzistas vere multaj gazetoj, tamen oni aŭdas ĉiam ĉie voĉon plendan pri la manko de simpla presajo, kiu alportas legaĵon facilan, sed freŝvivan, kaj kiu enkondukas vivantan Esperanton profunden en ĉiutaga vivo de esperantistoj. Jen la unua signifo de TEMPO.

Tiurilate TEMPO iom pensigas al la nuna MONATO. Sed alian rolon ĝi ankaŭ celis. Ni citas: "La estonta kreskado de niaj fortoj faros TEMPO-n la forta voĉo el Japanlando al la tuta mondo, informanta pri ĉiufankaj veraj situacioj de nia lando, ne pri tia misterplena Japanlando, kia ĝis nun ofte misprezentata fantazie.

Fakte **TEMPO** plenumis tiun duoblan rolon. Ĝia tralego multon malkovrigis al mi pri la Japanio konkerema de antaŭ la dua mondmilito kaj ankaŭ pri la enlandaj konsekvencoj de la milito kontraŭ Ĉinujo kaj de la alianciĝo kun la nazia Germanujo. Eĉ la esperantistojn, kiuj provis resti iom neŭtralaj en tiuj konfliktoj, iom post iom englutis la milit-konflikto. Sed en novembro 1934 en Japanujo oni rakontas pri alia uragano, ol la milito. Ĉirkaŭ la salutvortoj

troviĝas raporto titolita **Detrua ventego furiozis super Kyoto, Oosaka, Kobe**. Ĝi rakontas, kiel eĉ vagonaroj renversiĝis, konstruaĵoj de elementaj lernejoj detruigis en multaj lokoj, ktp. Pluraj artikoloj raportas pri tiuj uraganaj detruoj, aliaj pri eventoj en la mondo, interalie, ke Tokyo deklaras la nuligon de mararmea interkonsento kun Washington kaj Londono.

La priesperanta gazeto-parto raportas pri krizo en la budaista esperanto-movado, proponas, ke Universala Kongreso foje okazu en Japanio, kritike rilatas al naciisma ŝovinismo kaj fine rakontas pri pikniko post la ventego. Ni legos tiun raporton, kiu montras, ke la esperantistoj emis renkontiĝi. Tiu teksto, kiel vi konstatos, bone respegulas la tiamajn lingvajn mankojn de la japanaj esperantistoj:

"Estis nur post kelkaj tagoj de la furioza ventego, ke finfine alvenis la tago de nia pikniko. El la vagonara fenestro, ni ankoraŭ rigardis ruinigitajn konstruaĵojn tie kaj tie ĉi kaj estis stimulataj de la terura imago: se la mondo estus tiel terure detruita. Ni alvenis la stacion de Iŝijama. Jen renversita vagonaro frapis al mi la okulojn. Kelkaj el ni fotografis ĝin. Ni luis du ŝipetojn, kiuj agrable rulis sur spegulo de la rivero Seta. Aŭtunaj sunradioj kviete faladis sur la ŝipojn, kvazaŭ tute ne sciante la uraganon de antaŭ kelkaj tagoj. Sur la ŝipo, mi ankaŭ prezentis al mi la rememoron de granda detruo en Kanto-distrikto. Tiam homoj en Kantio tremegis sian animon kaj ekstreme freneziĝis sur ruinaĵo, sed infanoj, starante sur tute detruita domo, multe ĝojis kaj frapis la senkulpajn manojn, dirante, ke jen vidiĝas la ĉielo, la steloj brilantaj. Infanoj ne timas grandan naturon, kvankam aroganta ago de naturo forprenis multe da infanoj el la mondo. Mi volas batalrompi la grandan naturon per mekanika civilizacio, progresigitan de scienco. Samideanoj en ŝipoj komencis interŝanĝi siajn opiniojn pri teknikaj vortoj enkondukataj en Esperanton, dume iu remis anstataŭ la ŝipisto. Malgraŭ tio, baldaŭ la ŝipoj atingis la bordon de Nango, kaj ni forlasis la ŝipojn kaj piedmarŝis sur malrektaj vojoj al monto Tanokami. Post tri kvaronoj da horo, ni troviĝis sur la sablo de la bela rivero Tenĵin. Dum iom da tempo ni ripozis kaj ĉerpis puran akvon. Post la fotografado de samideano Jamaguĉi, ni plue supreniris laŭ la rivero, pure fluanta inter multaj rokoj. Marŝinte longan vojon, mi atingis la plej belan lokon, kie ni tagmanĝis. Bela loko! Ni kiel infanoj, ĝojante saltis inter rokoj kaj grimpis rokon sur roko. Danĝere minacis nin sur la kapo unu granda roko, sur kiu iu skribis la literojn Esperanto, kaj malfermis parolan rondon. Tie ni ĝuis la belan aŭtunon kaj amikiĝon ĝis kontentiĝo. Samideano Jamaguĉi kinematografis nin, bonaj aktoroj kaj aktorinoj, per sia maŝino. Mi estas avide atendantita la sekvan monatan kunvenon de la Kioto-esperantistaro, kiam estos elmontrata la filmo, en kiu niaj gesteloj, entute, ludis la plej lertan rolon.

Tiel komenciĝis la vivo de la **monata gazeto TEMPO**, kiu vigligos dum seso da jaroj la japanan esperantismon, verkigante skribemajn legantojn, unuigante entrepreneman redaktaron, kiun bedaŭrinde la milito subite neniigos. La atenta tralego de tia revu-kolekto ne nur helpas nin pli bone kompreni la etoson, kiu karakterizis la tiaman esperantistaron en Japanio. Ĝi ankaŭ ebligas trastudi la lingvajn problemojn, kiujn alfrontis la japana esperantistaro.

Riĉigas tiun reeldonon postparoloj de NOZIMA Yasutaro kaj Ulrich LINS. La venontan semajon ni ĉerpos el tiu studo por iom pli serioze raporti pri tiu reeldonita gazeto TEMPO kaj pri ties influo en Japanio.

CL.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude GACOND diras al vi: Ĝis reaŭdo!